

Dies iræ, dies illa

Sekvenco, Brevier-Himno

Meso por mortintoj (Rekviemo) > sekvenco laŭplaĉa
Ordinara tempo > lasta semajno de la liturgia jaro > himno laŭplaĉa

La sekvenco konsistas el la tri himnoj (sen doksologio) kaj la 2-linia fina strofo.

Himno por la horo de la legaĵoj:

*Dies iræ, dies illa
solvet sæclum in favilla,
teste David cum Sibylla.*

*Quantus tremor est futurus,
quando iudex est venturus,
cuncta stricte discussurus!*

*Tuba mirum spargens sonum
per sepulcra regionum,
coget omnes ante thronum.*

*Mors stupebit et natura,
cum resurget creatura,
iudicanti responsura.*

*Liber scriptus proferetur,
in quo totum continetur
unde mundus iudicetur.*

*Iudex ergo cum sedebit,
quicquid latet apparebit;
nil inultum remanebit.*

Doksologio:

*O tu, Deus maiestatis,
alme candor Trinitatis,
nos coniunge cum beatis.*

Amen.

Tag' alvenos de kolero,
cindre diseriĝos tero
laŭ profeto-vorta vero.

Kia do tremado estos,
kiam la juĝist' majestos,
ĉiujn per rigor' molestos.

Tubjo ĵetos strangan sonon,
skuos tomban regionon,
puŝos ĉiujn antaŭ tronon.

Morto kaj naturo miros,
kiam hom' el tombo iros,
al juĝist' respondon diros.

La juĝist' kun libro venos, *
kiu ĉion ene tenos,
kio mondon pun-ĉagrenos.

Por la juĝo li eksidos, **
kaŝitaĵojn Li ekvidos,
Li pri ĉiu far' decidos.

Ho majesta Triunuo,
min konduku al la ĝuo
de l' eterna vivo-fluo. Amen.

Aŭ, kantante, en la originala ritmo:

Kaj en mia lasta hor'
gvidu min al Via glor'. Amen.

La unuaj linioj estas ŝanĝitaj pro la parolota ritmo. Se oni kantas la himnon laŭ la konata gregoria melodio, oni uzu la version de ADORU 082:

* Juĝisto kun libro venos,

** Li por la juĝo eksidos,

Himno por la matena laŭdo:

*Quid sum miser tunc dicturus,
quem patronum rogaturus,
cum vix iustus sit securus?*

*Rex tremendæ maiestatis,
qui salvandos salvas gratis,
salva me, fons pietatis.*

*Recordare, Iesu pie,
quod sum causa tuæ viæ,
ne me perdas illa die.*

*Quærens me sedisti lassus,
redemisti crucem passus;
tantus labor non sit cassus.*

*Iuste iudex ultionis,
donum fac remissionis
ante diem rationis.*

*Ingemisco, tamquam reus,
culpa rubet vultus meus,
supplicanti parce, Deus.*

Doksologio:

*O tu, Deus maiestatis,
alme candor Trinitatis,
nos coniunge cum beatis.*

Amen.

Kion diros mi mizera?
Kie propetant' sincera?
Tremos eĉ virtulo vera.

Reĝo de altec' terura,
savas Vi pro graco nura,
savu min, am-fonto pura.

Vi ja serĉis min ĝis sveno,
savis min per kruc-ĉagreno:
Ne vaniĝu tia peno!

Konsciiĝu, Filo Dia:
Kulpas mi pri vojo Via.
Gardu min je tago tia.

Vi juĝanta kun rigoro, *
min pardonu pro favoro
antaŭ la verdikta horo.

Min ĝemigas abomeno, **
kulpe ruĝas la mieno:
Di', indulgu min per beno.

Ho majesta Triunuo,
min konduku al la ĝuo
de l' eterna vivo-fluo. Amen.

Aŭ, kantante, en la originala ritmo:

Kaj en mia lasta hor'
gvidu min al Via glor'. Amen.

La unuaj linioj estas ŝanĝitaj pro la parolota ritmo. Se oni kantas la himnon laŭ la konata gregoria melodio, oni uzu la version de ADORU 082:

* Juĝanta Vi kun rigoro,

** Ĝemigas min abomeno,

Himno por la vespera laŭdo:

*Peccatricem qui solvisti
et latronem exaudisti,
mihi quoque spem dedisti.*

*Preces meæ non sunt dignæ,
sed tu, bonus, fac benigne
ne perenni cremer igne.*

*Inter oves locum præsta,
et ab hædis me sequestra,
statuens in parte dextra.*

*Confutatis maledictis,
flammis acribus addictis,
voca me cum benedictis.*

*Oro supplex et acclinis,
cor contritum quasi cinis,
gere curam mei finis.*

*Lacrimosa dies illa,
qua resurget ex favilla
iudicandus homo reus.
Huic ergo parce, Deus.*

Doksologio:

*O tu, Deus maiestatis,
alme candor Trinitatis,
nos coniunge cum beatis.*

Amen.

Al Maria Vi pardonis,
savon al krimul' proponis,
eĉ al mi esperon donis.

Mia preĝ' ne indas famon,
sed Vi, bona, montru amon,
pelu for eternan flamon.

Post mutigo de l' damnitaj,
post punad' per flam-ekscitoj
voku min kun virt-spiritaj.

Inter ŝafojn Vi min metu,
inter kaprojn ne forĵetu;
dekstra flanko por mi pretu.

Mi petegas Vin kun klino,
cindre pentas mia sino:
zorgu do pri mia fino.

Jen la tago de la ploro:
el la cindro kun angoro
hom' leviĝos por la juĝo.
Estu, Dio, do rifuĝo.

Ho majesta Triunuo,
min konduku al la ĝuo
de l' eterna vivo-fluo. Amen.

Aŭ, kantante, en la originala ritmo:

Kaj en mia lasta hor'
gvidu min al Via glori'. Amen.

En Rekviemo (ĉiuj tri partoj, sen doksologio)
oni finas jene:

*Pie Iesu Domine,
dona eis requiem.*

Amen.

Ho Jesuo, pro fidel'
gvidu ilin al ĉiel'.

Amen.

latina T: anonima,
eble de Tomaso el Celano (ĉ. 1190 - ĉ. 1260)

E: Guido Holz 1986, 2001 en ADORU 082;
doksologioj: Albrecht Kronenberger 2007